

# LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE OCH NORGE

UTGIVEN AV SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Oficiala organo por Sveda Esperanto-Federacio (S. E. F.) kaj Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

4a Jaro  
N:o 5.

Redakcio: J. LUNDGREN, Hedemora, J. HELSING, Gävle, H. BONNEVIE, Kristiania Adreso por korespondado: Gävle, Svedujo. Ansvarig utgivare — Responda eldonanto kaj administranto: W. WAHLUND, Gävle. Prenumerationspris — Abonprezo: i Sverige 1:50 kr., i Norge 1:75 kr., eksterlande 1:1 Sm. (2:— kr.). Lösnummer 15 öre. Annoncpris — Anonprezo: 5 öre pr mm.

Majo  
1916.



Robert Bárány.

Unu el la multaj sciencistoj, kiuj apartenas al la esperantistaro, estas D-ro Robert Bárány el Wien, kies sciencaj esploroj estis rekompencataj en la lastpasinta jaro per Nobel-premio.\*)



### Proverboj.

Ne ĉio brilanta estas diamanto.  
Mordanta hundo kuras ĉiam kun vundo.  
Volanta kruro ne laciĝas de kuro.  
Bono posedata ne estas ŝatata.  
Neleĝe akirita ne estas profita.  
Eminenta ŝuldanto, malbona paganto.

\*) Vidu La Esperon, decembro 1915.

## Kooperatöernes internationale samarbeide.

Ved den engelske kooperative kongres i Leichestre 1915 holdt lederen av Det internationale kooperative forbund, hr. A. Williams, en tale om bevægelsens fremtid, av hvilken tale »Kooperatören» gjen-gir det sidste avsnit, hvori hr. Williams beskæftiger sig med spørgsmaalet om, hvorledes den internationale bevægelses arbeide i fremtiden skal kunne fortsættes. Hr. Williams uttalte:

Ethvert medlem av forbundets komiteer er borger i et eller andet land og er som saadan naturligvis opfyldt av patriotiske følelser for sit land, men som medlem av forbundet maa han huske paa, at dette ikke repræsenterer én, men alle nationer. Vi medlemmer av forbundets forretningsudvalg er alle engelske, men vi har stadig undgaat alt hvad der kunde tydes som forsök paa at bringe forbundet til at ta parti paa engelsk side. Under krigen har det været mulig for os at understøtte og hjælpe nogen faa av de tusener av nonkombattanter som uten egen skyld har lidt under krigen. Efter krigen venter der os en endnu sværere opgave, nemlig at paakalde hjælp fra alle de kooperative organisationer verden over, som ikke selv har lidt under krigen, hjælp til at gjenoprette de hundreder av kooperative organisationer i forskjellige land, som er haardt rammet av krigen, om ikke fuldstændig lagt óde og oplóste. — —

Men hvad er det, som saa sørgelig hindrer vort internationale arbeide? Hvad er det, som under vore kongresser i kongreshallen besværliggjør vore forhandlinger og utenfor denne næsten fuldstændig forhindrer os i at utveksle tanker med vore utenlandske meningsfæller, som skulde bli vore venner? Det er sproget, men denne hindring er ikke uovervindelig. Der er allerede skedd en stor opfindelse — en av de største i verdens historie — som gjør det mulig for mænd, hvis sprog er forskjellig, at meddele sig til hverandre. Jeg haaper at se den tid komme, hvor det internationale forbund vil gjøre sin store del til at spræde kjendskapet til det vidunderlige verdenssprog Esperanto, som enhver kan lære paa faa dage, og hvor organisationerne i alle land vil oprette kursus for undervisning i Esperanto. Da — og først da — vil vi bli istand til virkelig at mótes og samtale med vore utenlandske venner og behóver ikke at nóies med at betragte dem, saaledes som vi gjør nu.



Se la gasto estas amata,  
Eĉ lia servanto ne estas malsata.

Petolado sen mezuro  
ne kondukas al plezuro.

Hakado de ligno donas lignerojn.  
Barelo malplena sonas plej laŭte.  
Rado malbona knaras plej multe.  
Sen povo kolero estas ridinda afero.  
Kiu nenion valoras, plej multe sin glorias.

**Axel Johanssons** 1:sta klass Damskrädderi & Kappaffär  
N. Kungsgatan 17, GÄVLE, Rekommenderas. Tel. 1939.

## Meditaĵoj pri alvokoj 1915 de la norvegaj pacamikoj kaj 1914 de la Anti-Oorlog-Raad, kaj propono al konkreta internacia programo por la 3a Haagkonferenco

De B. Jhss. Klingenberg,  
Infanterikapitano.

### V

La demando: »Ĉu modifado de landlimoj povas esti farota sen permeso de la rilataj popoloj?» kaŭzas sekvantajn rimarkojn. Kiel politika principo ĝi nur havas valoron, kiam perforta potenco realigas ĝin. (Militfino de Prago § 5). La kontraktmaniere donita permeso havas ne niun signifon.

Dum kiam oni ne estas kapabla tute forigi la militon, tiam oni por eviti senĉesan militstaton estas vipe devigata konsenti pri la rajto de venkakiro. Cetere oni povas prave rezervi al la internacia pacregistaro la rajton de senpropraĵigo de la distriktoj, kies ekokupo estas necesa por progresigi la interesojn de la internacia paco. Estas memkompreneble ke la senpropraĵigo kaj okupo estos farata kun plena rekompenco.

Estos dume natura rezultato de la konstante laborantaj, internaciaj pacinstitucioj, kiuj iom post iom prenos sur sin la diplomatajn laborojn, tiel por la burĝoj de la patrinlando kiel por la anoj de la kolonioj, ke tiuj ĉi portos al tiuj pacinstitucioj siajn dezirojn pri rilatoj, kiujn oni deziras plibonigotaj per la naciaj reprezentantoj en la internacia pacparlamento.

Kaj la demando pri modifado de landlimoj kaj la principo de libera ŝanĝo de komercaĵoj per internacia konvencio, aŭ almenaŭ akceptado de egala priago de ĉiuj nacioj en la koloniaj regionoj, kaj ankaŭ la dezirata plibonigo de la rivalado de la nacioj pri produktado kaj dividado, konforme al iliaj reciprokaj foiroj, atendas la naciajn pacparlamentojn, kiuj kombine kun la internacia pacparlamento formos la popolrajton sur la kampoj de la paco, sur kiuj oni kun granda profito povas starigi tian rajton.

Sed oni ne devas sin forbabili en tiu antaŭfarita supozo, ke la popolrajto povos esti egala por ĉiaj regionoj de la mondo.

Eĉ se la ĉefdirekto estas la sama, la loka praktiko devas esti karakterizata per la lokaj vivkondiĉoj. Por nur preni ekzemplon ĉerpitan el la virina postulo ĉe la packongreso 1915 pri samaj politikaj rajtoj por virinoj kiel por la viroj. Tiu postulo estas antaŭmetita kiel fundamento por konservado de la interpopola kaj internacia paco, — do valoranta por nia tuta mondo. Nun estas la virinoj en la Nordo patrinoj nur en la 20a—22a jaro, bone edukitaj kaj laborpovantaj, kaj ĝenerale tre sciantaj kaj sufiĉe socie komprenantaj: en la varma terzono la virinoj estas patrinoj jam en la 14a—15a jaro, kaj estus maleble kaj danĝere konstrui malhelpilon kontraŭ la natura evoluo. La spirita maturiĝo, kiu devas esti la sama en la Nordo kaj la Sudo, devas esti gajnata sub tute aliaj, sociaj rilatoj kaj ankaŭ per aliaj labormetodoj en la varma terzono, ĉar la spirita maturiĝo ordinare ne estas atingata ĝis la 14a aŭ 15a jaro.

Sur ĉiuj kampoj de la pozitiva paclaboro montriĝos maleble estonte progresi sen la naciaj kaj la internacia pacparlamentoj kaj ni venas el aliaj premisoj en la saman rezultaton kiel la Varberga rezolucio, — »rilatas nun pri la ŝanĝo de la tuta eŭropa ŝtatsistemo».

La holanda programo antaŭmetas por diskuto la antaŭe montritan demandon pri plibonigo de la konkurado je produktado. En la historio de la protektimposto kaj en la rapida kresko de la kooperativa komercmaniero oni havas montrilojn por la venonta direkto. Sed la evolucio de novaj teknikaj labormetodoj en la maŝindustrio kaj la sciencaj eksperimentmetodoj postulos ĉiam grandan kapitalon, kaj pro tio grandan teritorion por fiksa vendo kun ebla aliro al la internacia foiro.

Kiam la internacia pacbank-sistemo kaj la pacamikoj progresigos kooperan komercsistemon kaj en konsumo kaj en produktado sin apogos sur la maŝindustrio kun la plej malmultekostaj labormetodoj, tiam oni certe solvos la ekstarantajn malfacilaĵojn plej facile, kaj metos bonmezuritajn bridojn sur tro fortaj komercaj speculacioj.

Sed mi inkliniĝas supozi, ke la malfacilaĵoj sin kaŝas en malbona aranĝo en la internacia komercado kun artefikaj kombinoj kaj tro multe da perantoj. Tiuj-ĉi cirkonstancoj plikostigas la komercaĵojn. Ankaŭ

sur tiu kampo mankas al la homaro praktikaj centrainstitucioj, kiuj donus fidindan superrigardon, laborus por intereso de la konsumantoj kaj speciale prenos sur sin la celon aranĝi la interrilatojn inter produktantoj kaj konsumantoj sen perantoj.



## La paliskonstruaĵoj en Svisujo.

### IV.

Tie, kie kulturtavoloj plurfoste kuŝas unu super alia sur sama loko, kaj do dua kaj tria vilaĝoj konstruiĝis sur la restaĵoj de iu unua — malaperinta per brulo aŭ alia kaŭzo — kie generacioj post generacioj en nekalkulebla vico do dronigis en la akvon sian domobjektaron, tie oni povis rekoni kun certeco la malrapidan evoluadon de la kulturo de la paliskonstrua epoko. Ĉiu objekto estis unue elpensata, poste provata, kaj fine ĝenerale uzata — ordinare kiel logika sekvo kaj evoluo de iu plifrua elpensajo.

Tia historia intersekvado senvualigis plej bone en la paliskonstruaĵaro ĉe Robenhausen apud Pfeffiklago, aperinta en 1858 kaŭze de flureguligo, kaj pro la klopodoj de la grundposedanto, vilaĝano Jakob Messikomer, dum jardekoj fervore elesplorata. Jam ne en la lagfundo mem troviĝas tie la restaĵoj de la estintaj loĝejoj, sed anstataŭe en grandega torfejo ĉe la suda fino de la akvujo, en kiu mem ĝi kompreneble iutempe troviĝis kiam ankoraŭ la ondoj de la lago brilis tie, kie nun estas torfgrundo. Vilaĝoj evidente trifoje konstruiĝis kaj dronis tie, kaj ĉar la loĝejoj — laŭ la restantaj palisoj — etendiĝis sur regiono da sume 13,000 kvadratmetroj, la trovitaĵo estis egalmesure tiel grandkvanta kiel diversa. La torfo estis bonega konservilo; ĝi konservis kaj ŝirmis eĉ objektojn, kiujn la tempo aliokaze tre baldaŭ estus detruinta.

En la palisvilaĝo ĉe Robenhausen oni kun granda surprizo trovis produktojn de teksarto jam ne komenca, kiun sciis la loĝantoj eĉ en la plejfrua el la tri sinsekve konstruitaj vilaĝoj. Kune kun tapiŝoj el junko kaj basto, kune kun beletaj

korboj kaj aliaj plekt- kaj nodla- borajoj, kiuj verŝajne estis la antaŭ- ŝtupo antaŭ la pli grava puntigado, tie troviĝis multe da linteksaĵoj kun diversaj koloroj, pasamentaĵoj kun franĝoj kaj tufoj, kaj ankaŭ bobenaĵoj da fadenoj uzitaj por tiu labor- ado. Por ke nenia dubo ekzistu, ke tiuj produktoj estis hejme faritaj, la paliskonstruajanoj, kvazaŭ por plifaciligi la esplorojn, postrestigis je kontentiga pleneco la laborilojn kune kun la produktoj. Linrompiloj, ŝpiniloj, bobenoj kaj teksosagoj, entute ĉiuj por linpreparado necesaj iloj troviĝis en la kulturtavoloj ĉe Robenhausen; fidinde atestante ne nur pri la antaŭhistoria teksarto, sed ankaŭ ke la loĝantoj jam, mal- simile al la diluvialhomoj, ne kovris siajn korpojn nur per feloj.

La vazfarado estis alia artmetio en la palisvilaĝo. Pri la torddisko oni kompreneble ne devas pensi nun; nur en historia epoko ĝi estis eltrovata. La unuaj efektivaj vazoj estis ja malgraciaj je formo kaj krudaj je tehniko, kiel ĉiu ilo estis je la komenciĝo. Sed la estetika gusto akcelis la evoluadon. La korb- plektado liveris modelojn, kaj la postimpreso de la ŝnuro, kiun oni — dum alia portilo ankoraŭ ne ek- zistis — metis ĉirkaŭ ĝian kolon, eble estas konsiderinda kiel pramo- delo de la multfoje troviĝantaj ŝnur- ornamoj, krom kiuj iom post iom aliaj ornamoj estis elpensataj. Ne urĝas tre vigla fantazio por imagi la laŭpaŝan, kvankam relative rapi- dan, evoluadon de la jam eltrovita keramikarto, precipe ĉar tiu arto apartenis al »la pli bona duono» de la paliscivitanoj, dum la viroj oku- pis sin per fiŝkaptado sur la lago, aŭ persekutis ursojn kaj lupojn en la arbaro. Rektaj montroj atestas, ke la bela sekso en la paliskonstrua epoko pretigis tiujn artajn vazojn kaj kalikojn, kiuj nun plenigas ŝrankojn en muzeoj: per rekopiado de la postrestintaj delikataj fingro- impresoj en la mola argilo. Vira mano, kiu faligis arbarajn trunkojn, ne aspektis tiel; nur mallarĝa virin- mano povis tiel delikate eternigi sin.



Bliv medlem av

**Svenska Esperanto-Förbundet!**

Esperantorörelsen behöver Eder medverkan.

## Ju, kiu ne satas akvon.

De Peter Rosegger.

»Rilate al mi<sup>1)</sup>, ne bezonas esti akvo en la mondo!» diris maljuna kamparano<sup>2)</sup>. Ke li do ankaŭ sian lakton, sian supon, siajn legomojn devus malhavi<sup>3)</sup>, kiel ankaŭ sian glaseton da ruĝvino kaj fine eĉ sin mem, kiu je naŭ dekonoj konsistas el akvo, pri tio<sup>4)</sup> li ne pensis. La diron li faris<sup>5)</sup> kaŭze de malgranda pieddifekto, kiam la kuracisto ĉe la esploro<sup>6)</sup> rimarkis: »kara viro, vi devus bani vin iufoje».

»Ne estas eble», diris pro tio la viro, preskaŭ ruĝigante, »tion mi ne faris eĉ kiam mi estis juna. Tia akvomalsekigo ne efikas bone al mi<sup>7)</sup>. Tre ofte en mia vivo mi estis malseka ĝis la haŭto. Tio ĉiufoje donis al mi nazkataron aŭ dentdo- laron aŭ artikusuferojn. Malseka- aĵon<sup>8)</sup> mi ne toleras.»

»Tamen ja interne<sup>9)</sup>», ridis la kuracisto. »Kiel ekzemplo: se oni soifas, akvo estas la plejbona.»

»Tre malofte mi soifas», respondis la malgrasa maljunulo. »Tiam mi jam ne estas tute sana<sup>10)</sup>, se mi iam soifas.»

»Tamen vi trinkas vinon!»

»Ĉiuvespere kvaronon<sup>11)</sup>. Ne pro soifo. Ĝuste nur ĉar gustas bone<sup>12)</sup>, mi devas diri. Kaj ĉar oni iom plivigliĝas<sup>13)</sup>. Akvon! Eĉ ne kre- das<sup>14)</sup>, ke mi trinkis du sitelojn da akvo en la tuta vivo. Rilate al mi, ne bezonas esti akvo en la mondo. Tiaokaze mi ne bezonus multe ŝviti. Preferas esti seka<sup>15)</sup>. Estas je homoj<sup>16)</sup>, kiel je ligno. Se ĝi ofte malsekiĝas, ĝi difektiĝas<sup>17)</sup>. Sed mi restas ankoraŭ sana.»

»Tre bone!» diris kuracisto. »Vi devas ja esti jam proksimume sep- dekjara?»

»Ne! ne ankoraŭ. Sesdek ok. Nur pli multe je kelkaj semajnoj<sup>18)</sup>.»

La kuracisto ne parolis pli multe pri banado.

Traduko el la germana lingvo.

1) vad mig beträff.r.  
2) kampo = fält; kamparo = landsbygd; kamparano = lantman.  
3) umbära.  
4) på det, eller: därpå.  
5) han gjorde uttalandet; han fällde detta yttrande.  
6) undersökningen.  
7) sådant vatte biötand: skulle ej verka bra på mig; — — skulle inte göra mig gott.  
8) väta.

9) men invändigt i alla fall; ja motsvarar svenska ordet ju, kan således även översättas med: visserligen, otvivelaktigt o. s. v.  
10) då är jag inte längre riktigt frisk.  
11) varje kväll ett kvart-r.  
12) just bara därför att det smakar bra.  
13) och därför att man blir litet kryare.  
14) tror icke ens — — —  
15) föredrager att vara torr  
16) det är med människor — — —  
17) om det ofta blir vått, skadas det.  
18) endast några veckor mera.



## Upprop.

I och för organisering av bokför- sändelser till krigsfångar i Tysk- land, ryska riket och Österrike-Un- gern, riktas härmed en vädjan till den svenska allmänheten att genom frivilliga gåvor av penningar och böcker i sin mån tillgodose den syn- nerligen stora och ivriga efterfrå- gan av läsning i fånglägren. Då samtliga med detta arbete förenade kostnader måste bestridas av insam- lade medel, vågar Bokinsamlings- kommittén (vid svenska Röda korsets hjälpkommitté för krigsfångar) på- räkna den svenska allmänhetens benägna bidrag, för att möjliggöra verksamheten.

Bland böcker som önskas:

1) Alla slags ordböcker och läro- böcker i nu levande och döda språk.

Läroböcker i Esperanto och steno- grafi; läroböcker i humanistiska, naturvetenskapliga och tekniska ämnen (bl. a. för universitetsstudier)

2) Vetenskapliga arbeten inom al- la fack.

3) Biblar, psalm- och sångböcker och annan religiös litteratur.

4) Resebeskrivningar och biogra- fier och skönlitteratur, klassisk och modern, på originalspråk och i över- sättning.

5) Musikalier.

6) Planschverk och tidskrifter.

Alla böcker skola enligt gällande bestämmelser vara utgivna före 1914.

Böckerna skola utan kostnad för kommittén avlämnas till Bokinsam- lingskommittén, Rikstel. 178 60, Vap- naregatan 1, Stockholm. Penninge- bidrag torde insändas till direktör G. Fogelmarck, Kammakareg. 4.

Margareta. Carl.

Nath. Söderblom. W. Didring.



**DAMER!** Kappor och promenaddräkter köper Ni billigast hos AXEL JOHANSSON.

N. KUNGSGATAN 17, GÄVLE. TEL. 1939



### Holland.

En esperantoklubb med 34 medlemmar bildad i Nijmegen.

Esperantokurs i Venlo med ett 20-tal deltagare.

I interneringslägret i Zeist har öppnats den fjärde esperantokursen med 25 lärjungar.

### Ryssland.

Den mycket spridda läkaretidningen »Russkij Vrač» har börjat att i varje nummer införa sammandrag på Esperanto av originalartiklarna.

Esperantokurser i gymnasiet i Rjajsk (guvernementet Rjazan) samt för sårade soldater i Pjatigorsk.

### Tyskland.

I Chemnitz har »utskottet för ungdomsvård» anordnat en esperantokurs med 23 deltagare.

I Essen öppnades i slutet av april en ny esperantokurs.

I Gera (Reuss) har den 12:te esperantokursen tagit sin början. Esperantoföreningen företog den 9 februari utfärd till byn Reust, där sammanträffande med saschiska esperantister ägde rum. Läraren i platsens folkskola var även närvarande tillsammans med 8 skolbarn, som av honom undervisas i Esperanto.

I Hamburg—Altona en esperantokurs för 50 flickor.

Föreningen »Leibniz» i Leipzig har under 1915 anordnat några esperantokurser, som varit väl besökta. Ny kurs med 12 deltagare började den 1 febr.

Esperantokurs för 26 ryska krigsfångar i Küstrin; ledare är en reservofficer Begišev från Moskva.

### Österrike.

En esperantokurs för nybörjare, anordnad av Arbetarnes Turistförening i Pilsen, har avslutats och två nya kurser anordnats. Intresset i Pilsen för Esperanto är nu större än någonsin förut. Nämnda förening har utgivit prospekt på Esperanto och söker esperantokorrespondenter i andra länder. Adress: Josef Peck, »Laborista Unuiĝo Turista», Pilsen, Houškova ulice 4 Böhmen, Österrike.

Kurs för övning i samtal på Esperanto hålles nu av lärarnes esperantoförening Wien såsom fortsättning på en avslutad kurs för nybörjare.

### Storbritannien.

Esperantokurs bland de tyska krigsfångarna på ön Man.

En artikelserie om Esperanto i tidningen »The World Socialist» samt en utmärkt propagandaartikel »Red Cross Ambulance News».

### Nordamerika.

Föredrag om Esperanto i Litteratursällskapet Franklin i Brooklyn, N. Y.

Esperantokurs vid universitetet i Valparaiso, Ind.

En esperantoklubb bildad inom K. F. U. M., i Dallas, Tex.

~~Esperantokurs~~

### Brasilien.

Vid 4:de Brasilianska geografkongressen, som ägde rum i Recife (Pernambuco) under september 1915, antogs enhälligt följande uttalande:

»Med hänsyn till den stora fördel, som antagandet av ett internationellt hjälpspråk skall medföra för de mellanfolkliga förbindelserna, och på grund av att Esperanto besitter alla nödvändiga egenskaper för sådan användning, beslutar 4:de Brasilianska kongressen för geografi att uttala sin sympati för hjälpspråket Esperanto och att förorda dess användning i publikationer och vid internationella kongresser».

### Kina.

Av kinesiska esperantoförbundets korrespondenskurs hava utsänts över 18,000 exemplar.

Esperantoföreningar bildade Fučou och Hongkong.

Esperantokurser i juridiska och tekniska läroverken i Hunan samt i vardera av de sex fakulteterna vid högskolan i Nangking.



### Esperanto-Unuiĝo Kärnten

Adreso: Villach, Aŭstrio,

estus treege danka por esperantistaj sendaĵoj kaj skribaĵoj, esperante ricevi per tio varban materialon.

## Sveda Kroniko.

### La poresperanta militiro de la »Blankarmeas Generalo».

Antaŭ aŭskultantaro de 150 personoj la konata kontraŭmilita batalanto Pastro Alb. Wickman paroladis en Helsingborg dimanĉon la 12-an de Marto.

Pastro W. estas unuaranga propagandisto, kaj ni esperantistoj plenrajte povas nin gratuli pro tio, ke sukcesis al ni varbi por nia afero tiel entuziasman kaj entuziasmigan personon. La »interna ideo» de la esperantismo, tiom malŝatata de multaj el niaj samideanoj svedaj, evidente trapenetris la tutan personon de nia pastro. Kaj jen la kaŭzo, pro kiu liaj vortoj elfluas kvazaŭ rekte el lia koro kaj ankaŭ trafas sian celon: la homan koron. Ĉi-tie ofte dum lia parolado multaj okuloj estis malsekaj de larmoj kaj estis evidente, ke li ekflamigis fajron de entuziasmo en multaj brustoj. Ĉu la fajrero fariĝos iam varmiga flamo, aŭ baldaŭ estingiĝos, tio dependas de kaŭzoj, pri kiuj mi nun ne volas paroli.

Kaj la enhavo de liai parolado! Ĉu mi devas citi ion el ĝi? Apenaŭ bezoneble, ĉar ĝi estas jam antaŭe bone konata de ĉiuj esperantistoj. Kiom diri, kio ne antaŭe estas dirita? Tamen troviĝas vortoj, kiujn oni ne tro ofte povas elparoli. Tial aŭskultu dum momento jenajn vortojn de la pastro: »For ĉiujn barojn inter la popoloj, for ĉion, kio disigas ilin, faras ilin fremdaj unu al la alia! For ĉion, kio malfaciligas kunlaboron, unuecon kaj interkonsenton inter diversaj popoloj kaj gentoj!» Kaj plue aŭskultu: »Esperanto estas al la homaro donaco tiom granda kaj multvalora kiom estas la vapora kaj elektra fortoj, telegrafo, fervojoj, vaporŝipoj. Ĝi estas spirita interkomunikilo, kiu jam trairis tra la tuta mondo.»

Kompreneble oni tre aplaudis la paroladon kaj unuanime akceptis tiun resolucion, jam antaŭe konatan de la legantaro de »la Espero», kiun S-ro W. ĉiam proponas al la aŭskultantoj, tuj kiam finiĝis la parolado. Ofereme oni ankaŭ aranĝis monkollekton por lia estonta agado.

Pri la reala rezulto por Esperanto de la parolado ankoraŭ estas tro frue esprimi ian opinion. Tiu, kiu

skribas ĉi tiujn liniojn proponis al kelkaj ĉeestantaj soldatoj mobilizitaj fari senpagan kurson en la kazerno. De ili mi ĝis nun nenion aŭdis, sed hodiaŭ, unu semajnon poste, min alparolis civilulo en la strato, kiu ĉeestis la paroladon, pri sama afero: aranĝi kurson.

En la daŭro de pasinta semajno S-ro W. paroladis en Åstorp, Engelholm, Halmstad kaj aliaj lokoj; en la tri nomitaj kun tre ĝojiga rezultato. Morgaŭ vespere mi vojaĝos al Åstorp por tie malfermi kurson kaj fondi grupon kaj proksiman dimanĉon mi samcele vizitos Halmstad, kie jam 18 personoj decidis komenci poresperantan laboron. El Engelholm mi ankoraŭ atendas inviton. Ĝi certe venos.

Vi do vidas, karaj samideanoj, ke la semoj, kiujn disŝutis S-ro W. sur la sudan Svedujon, almenaŭ parte enfalis en bonan teron. Ni neniam malesperu, se ankoraŭ ofte vana ŝajnas al ni nia laboro! Ankoraŭ troviĝas laborantoj en nia vinbereco. Kaj tiuj multe superos *nin*, jam grisharulojn en la servo de la esperantismo; ĉar ili estaj junaj kaj estas la junularo, kiu antaŭenigos nian aferon al fina venko. Kun kora saluto.

Helsingborg, 19-an de Marto 1916.  
*G. H. Backman.*

Gazeto »Hallandsposten» enhavis detalan raporton pri la parolado de S-ro Wickman la 14an de marto en Halmstad.

En Göteborg la parolado okazis la 16an de marto antaŭ proksimume 200 aŭskultantoj. La kunveno aprobis la deziresprimon pri esperanto-instruado en lernejoj. La intereso por Esperanto estas nun relative bona en Göteborg. Proksimume 50 personoj nun studas nian lingvon, kaj oni vigle korespondas kun samideanoj tiel svedaj kiel alilandaj. Daŭrigu, kamaradoj! la estonto estas nial!

En Tidaholm Pastro Wickman parolis al publiko da 175 personoj. Nia korespondanto aldonas: »malofte oratoro tiel sukcesas altiri komunan atenton al sia parolado. Saman vesperon okazis du baloj kaj unu bazaro, kio en tia malgranda urbo estas severa konkuro. Pastro Wickman tute entuziasmigis la publikon, kaj lia propagandego por Esperanto certe estos fruktoportanta. Ankaŭ Peter Berg el Kungslena faris mallongan paroladon.»

En Avesta Pastro Wickman paro-

lis la 8an de aprilo antaŭ publiko kiu plenigis la kunvenejon. La 9an de aprilo li laŭplane estus parolanta en Hedemora, sed anstataŭe devis vojaĝi al Nora kaŭze de alvoko al la juĝejo. Sinjorino Silva Wickman tamen paroladis pri la temo »Viroj de du specoj», en la komenco de la parolado varme atentigante pri la valoro de Esperanto. Ĉeestis 200 aŭskultantoj, kaj pluaĉento da personoj ne povis enveni la jam okupitan paroladejon.

Pastro Wickman ekdaŭrigis la esperantopropagandon per parolado en Falun la 12an de aprilo en la salono de »Laborista societo». La deziresprimo pri esperantoinstruado en lernejoj estis aprobata sen diskuto. La loka gazeto Länstidningen (»dekstro-partia»), kvankam sen simpatio por la paroladinto, tamen en sia raporto juĝas favore pri Esperanto. (Daŭriĝos.)

### Stockholm.

La 8an de aprilo okazis ordinara kunveno de Societo Verda Stelo. S-ro Rosengren paroladis pri vojaĝo tra »Saksa Svisujo», Svisujo kaj Tirolo, ilustrante per centnombro da koloritaj lumbildoj la paroladon. S-ro Oscar Andersson, membro de la opera ĥoristaro, kaj F:ino Maria Elman, aktorino, plenumis aliajn numerojn de la programo. Kelke da samideanoj el Persujo, Italujo, Germanujo kaj Rusujo ĉeestis la kunvenon, kaj je ilia nomo parolis S-ro Aleksandro Prager el Moskvo. La kunvenon partoprenis ĉirkaŭ 250 personoj.

### Valbo.

Pro invito de studrondo en Valbo S-ro Einar Adamson, el Gävle ĉe kunveno la 26an de marto faris raporton pri aranĝo de esperantokurso. La rezultato estas, ke kurso komenciĝis la 9an de aprilo sub gvidado de S-ro Adamson.

*Eran.*



En la militado oni trovas la sekvantajn ecojn: virto, honoro, devigo, kuraĝo, sindonado, almitemo, rabemo, malamo, abomeno; sed dum la militantoj aljuĝas la unuajn ecojn al si mem, ili donas la lastajn al la malamiko.

*Bertha von Suttner.*

## Regiono Kristiania de U. E. A.

raportas:

Ke la jarlibro por 1916 estas elsendita el la centra Oficejo senpere al la membroj. Se kelkaj membroj ne ricevis la libron, mi petas, ke la koncerna membro skribu al mi.

La adreso de VD.: O. B. Slette-röd estas korektita al »Nylands meĥaniklaborejo, Nylandsveien 33, Kristiania».


La nomo de la delegito en Trondhjem estas korektita »Ragnvald Rian».

Kristiania 23an 3. 16.

*Delegito.*



## Tri Limerikoj.



Okazis iam en Pjetrogrado ke sinjoro venis de la esplanado en unuaklasan restoracion. Komprenante la situacion li mendis glason da limonado.

Al la publiko en Saloniko tute mankas alumetfabriko. Por ekbruligi pipon, oni aplikis la principon, ke tio okazu per alia mekaniko.

Al hotelo en Lisabono venis fremdlanda barono. Li trempis plumon en inko. ĉar li, laŭ sia konvinko, ne povas skribi per krajono.



## Libroj kaj Gazetoj.

**Esperanto.** Udgivet af Danske Læreres Esperanto-Forening 1915. Prezo 5 öre (1000 ekz. kr. 28: —, 500 ekz. 15: —, 250 ekz. 8: —, 100 ekz. 4: —). Adr. Frk. Viceinspektice Astrid Rybo, Kommuneskolen ved Sundholm.

Tre bela danlingva propagandilo. Enhavo: el la historio de Esperanto, la 16 reguloj, k. t. p. Portreto de D-ro Zamenhof okupas la unuan paĝon. La malgranda broŝuro estas

bonege redaktita, kaj ĝi espereble bone utilis por pluprepari la landon de la 12a internacia kongreso de Esperanto.

Ĉar la dana lingvo-ĝenerale, kaj speciale ĝia kopenhaga dialekto, estas unika je sia fonetiko, ni dubas ĉu la donitaj prononcmontroj estas tute ĝustaj. Ekzemple la kopenhaga prononco de la vorto Teater sonas al sveda orelo proksimume ceäte aŭ ceäte. Sed verŝajne oni parolas unumaniere, kredante ke oni parolas alimaniere, kaj cetere ni scias ke niaj lertaj danaj samideanoj parolas Esperanton korekte, kvankam ilia a tiel ofte karakterizas ilin, kiel la speciala u la svedajn esperantistojn.

**La Ĥina Brileto**, Ĉiumonata gazeto por Esperanto. Red. K. Ĉ. Ŝan. Adm. T. Sem, 175 South Chengtu Rd., Ŝanghaj, Ĥinujo. Jarabono: alilande 0,70 Sm.

La ĥinoj formas kvaronon de la tuta homaro, kaj do ne estas tro frue, ke speciala neŭtrala organo estas eldonata por la esperantomovado en ilia lando. La gazeto impresas agrable, kaj la enhavo ŝajnas konsiderebla kiel tre bone kaj prudente elektita. La ricevita januara numero ampleksas 16 paĝojn en oktavformato, kaj ni kun plezuro uzis ĝin parte por nia svedlingva kroniko »Jordan Runt». Ni cetere deziras precipe mencii la tre simpacie verkitan programartikolon de S-ro Ŝan. Ĝi estas unu el la plej koncizaj tekstoj, kiujn ni iam legis. Ni gratulas kaj bondeziras.

»**Svisa Espero**» revekiĝis al freŝnova vivo, evidente kiel trafa reprezentilo de la svisa esperantistaro. Eliras ĉiumonate 12-paĝa numero, pli ol duone okupita de serioze valoraj rakontoj, cetere de en- kaj eksterlanda kroniko, mallongaj recenzoj pri ricevitaj gazetoj, ofte ankaŭ kiel temoj por esperantigado germanaj, francaj kaj italaj anekdotoj (aŭ aliaj mallongaj legaĵoj).

En la numero de aprilo 1916 la nuna redaktoro, s-ro R. de Saussure, ekdaŭrigas sub fako »redakcia babilo» siajn lertajn esplorojn de kelkaj lingvaj detaloj, ekzemple ĉu ni diru »spesmilo» aŭ »milpeso» (li konkludas ke ambaŭ formoj estas ĝustaj). Al nia norvega Esperantujo, kie malofte okazas io priparolinda, li dediĉas specialan atenton represinte raportleteron de f-ino M. Jansen.

H. B.

**Tidnings-Revyn.** En la fino de marto ni ricevis numeron por juaaro de revuo kun jena titolo kaj eldonita en Stockholm. La precipa enhavo estas diversaj notoj, tonditaj el malnovaj gazetoj kaj plejparte ne konservindaj. Tamen malplej valora estas la parto, kies pretendita temo estas la helplingva movado. La redakcio promesas akcepti tekstojn en kiu ajn lingvo, sed deklaras ke mankas la specialaj literoj por la fonetika ortografio de Esperanto. Tio estas tre karakteriza je la redakcio, kiam la gazeto estas presata de Wilhelmssons Tryckeri A. B., kiu efektive estas kapabla presi korektan Esperanton. (Ebla klarigo estus ke la kompostado ne okazas en la presejo.) Pri la plua aperado de tiu gazetrevuo ni scias nenion.

Rigardinto.

*Ricevitaj gazetoj por 1916:*  
 Amerika Esperantisto, jan.  
 Internacia Bulteno, marto.  
 The British Esperantist, marto, apr.  
 La Ĥina Brileto, jan.  
 Brazila Esperantisto, jan.—feb.  
 La Ondo de Esperanto, feb.—marto.  
 La Holanda Pioniro, marto.  
 Germana Esperantisto, marto A kaj B.  
 Esperanto, aprilo.  
 Le Monde Espérantiste, marto.  
 Svisa Espero, aprilo.



## Korespondado.

*Belga soldato,*  
 internigita en Holando de post la falo de Antverpeno, deziras korespondi kun svedo, aŭ letere aŭ poŝtkarte.

Adreso: *Hector Bruno*  
 4 Volontaires. B. 17.  
 Camp de Herderwijk.  
 Holando.

Voroneĵ (Rusujo). S-ro A. Sidorov, Gruzovaja ul 7, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Ĉiam respondos.

Anonceto pri korespondado kostas 40 oeroj (2 respondkuponoj).



## Esperantoföreningar.

I denna oroliga tid, då allt visar sig vilja gå i sammanslutningens tecken, är det nödvändigt att även esperantisterna här och var sammansluta sig enär enighet ger styrka.

En förening kan bildas av ett fåtal medlemmar vilka, om intresse och entusiasm finnas, åstadkomma att antalet utökas efter hand som undervisningen Esperanto bedrives.

Föreningsmedlemmarna skola hyssa förtroende och aktning för varandra samt vara beredvilliga att understödja föreningsarbetet, även som driva propaganda bland utomstående.

En sann esperantist är endast den som villigt bidrager med både den andliga och den materiella kraft, som han förfogar över. Detta må nu gälla avgifter till föreningen, abonnerande av en eller flera esp-tidningar, anskaffande av litteratur, och musikalier eller personlig medverkan till föreningens bästa. Föreningsarbetet bör noga vårdas och arbetsschemat vara omväxlande samt framför allt intressant, så att medlemmarna ej tröttna och likgiltigt besöka mötena, under förmenande att ingenting göres som håller deras intresse vid makt. Medlem bör infinna sig å bestämd tid, enär detta tillhör god ordning.

Mötet öppnas medelst unisont sjungande av La Espero, varefter de närvarande övergå till behandling av dagordningen. Sedan denna behandlats fortsättes med den övriga delen av programmet: musik, sång, deklamation och lekar med sång. Till här anförda får endast esperantotext användas. Vidare redogöres för Esperantorörelsen inom olika länder, samt hålles till sist samtalsövningar på Esperanto. Vid de tillfällen, då musik ej finnes att tillgå, kan bristen avhjälpas medels användande av grammofon, då sånger, deklamationer etc. på Esperanto finnas tillgängliga här för.

Sammanträde äger i regel rum varje månad. Vid lämplig väderlek företagas promenader eller sjöresor, då endast Esperanto får användas. Att tillvägagå på detta sätt medför otvivelaktigt en verksam propaganda.

Årsfesten bör hava en mera hög-

**DAMER!** Kappor och promenaddräkter köper Ni billigast hos AXEL JOHANSSON.

===== N. KUNGSGATAN 17, GÄVLE. ===== TEL. 1939. =====

tidlig prägel och till den skola inbjudas jämväl utomstående, vilka av det uppvisade böra få en gynnsam föreställning om det mål som esperantisterna sträva efter.

Då anbud kommer från föredrags-hållare och isynnerhet om dessa tillhåra främmande nationer, bör föreningen mottaga dem med välvilja.

I vårt land har sedan Esperanto hit infördes många föreningar sett dagen, men de flesta hava nedlagts. Orsakerna hava i många fall bestått i mindre väl vald ledning, som saknat förmåga att hålla i helgd Esperantismens mål, och följderna har ej uteblivit: sedan föreningen fört ett tynande liv har den slutligen upphört att finnas till, och flertalet av de i vårt land varande esperantisterna gå utan någon som helst organisation.

*Esperantist.*



## Världsspråksokynne i "Brand."

Redaktionen för tidningen Brand har, med riktig uppfattning av hjälpspråksrörelsens betydelse, upplåtit tidningens utrymme för diverse uttalanden angående densamma. Härvid har dock kvantiteten varit synnerligen stor i jämförelse med kvaliteten. I n:o 10 den 4 mars har således en mera skrivkunnig än sakkunnig medarbetare disponerat över en hel spalt för att säga absolut ingenting i sak. Denne person synes anse det som ett dödstecken, att esperantovärlden ej ägnar sig åt sådan rörelse, som består i att stå på en och samma fläck och skryta om inbillad egen förträfflighet. Att hänvisa en dylik individ till det sakförhållandet, att Esperanto år 1916 lever och blomstrar, trots ogynnsamma tidsförhållanden, vore antagligen lönlöst, ty enligt hans mening är framsteg och liv lika med godtagandet av diverse galenskaper, påhittade av ett par franska världsspråksamatörer.

Saken skulle ej blivit omnämnd i La Espero, om icke dylika utgjutelser, som den nu ifrågavarande, skadade hjälpspråksrörelsen, därigenom att de, oupphörligen upprepade, verkligen kunna ingiva sina läsare

den uppfattningen, att Esperanto är någonting ofantligt föråldrat och uselt i jämförelse med vad som utgives för att vara bättre.

Utan att närmare ingå i betraktelser över innebörden av och sanningen i den snusfornuftiga devisen: »framåtskridande är liv, stillastående är död», hänvisa vi i fråga om Esperantos framåtskridande till innehållet av La Espero, särskilt avdelningarna »Jorden Runt» och »Libroj kaj Gazetoj», som sannerligen ej förmåla om stillastående. Vill medarbetaren i Brand se på stillastående och död, då bör han skaffa sig kännedom om utbredningen och användningen av det värdelösa språkexperiment, som han tycks skatta högre än det neutrala mellanfolkliga hjälpspråket.

Vi återkomma *icke* till denna sak, som redan upptagit allt för mycket av vårt utrymme.

*La Espero.*



## Por temppasigo

12. (De Mene Tekel.)  
1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 = iakaptilo  
1 2 3 12 = homo  
11 3 2 12 = sonego  
5 6 7 8 10 9 12 = proksima loĝanto  
8 9 4 11 12 = konstrumaterialo  
11 12 13 5 12 = fendilo  
13 6 9 12 = tempmezuro  
10 8 4 12 = arbo.

13. Ekzistas duo kies fumo bonodoras, kies celo estas terparto, kaj kies tero troviĝas en teatro; kun k ĝi estas aro da arboj, kun t ĝi estas malpli ol la tuto.

Solvoj en la julia numero.

Vidu en la aprila numero la sciigon pri premioj al solvintoj.

Solvo de problemo 7 ensendita de S:ro A. Sidorov.



— Mi meditas pri kiaj virinoj estas la plej koketaj. Ĉu la blondaj, ĉu la brunaj?

— Demandu al Julia, ŝi estis ambaŭspeca!



## Gävle Esperantoförening

Ordinarie månadmöte avhålls tisdagen den 6 juni kl. 8 e. m. å föreningens lokal, N. Kungsgatan 5, 2 tr. (Lundgrens Handelsinst.).

### Från "La Esperos" Expedition, Gefle,

kan rekvireras utkommen litteratur m. m.

Å lager finnas **Läroböcker:**

Lärobok i Esperanto av P. Nylén.....	1: — + porto	0: 12
Lärobok i Esperanto av Carl Ohlsson ....	0: 50 + »	0: 08
(Alla med Esp.-svensk ordlista)		
Esperantospråklära av O. W. Hjærtstätt	0: 40 + porto	0: 08
Esp.-svensk ordbok av P. Ahlberg.....	1: 75 +	0: 16
Svensk-esp. ordbok av E. L-son Finn .....	1: 50 +	0: 12
Unua Legolibro av Dr. Kabe .....	1: 60 +	0: 12
Legolibreto .....	0: 25 +	0: 04
»Pario» av August Strindberg .....	0: 25 +	0: 04
»Fraŭlino Julie» av August Strindberg...	0: 75 +	0: 08
<b>Nova Testamento</b> (mjukt skinnband)...	2: 50 +	0: 30
«La Espero» oficiala himno esperantista, med musik .....	0: 60 +	0: 04
D:o d'o, propagandablad	0: 05 +	0: 04
Sveda Kantaro, kun melodioj .....	0: 35 +	0: 08
Esperantista Kantaro...	0: 75 +	0: 04
Världsspråksfrågan - en livsfråga av E. Adamson	0: 25 +	0: 04
Esperantostjärnor	0: 75 +	0: 10
D:o, (miniatyr) ..	0: 35 +	0: 10
D:o, (oficiella, för medlemmar av U. E. A.)	1: — + »	0: 10
Esperantobordsflaggor	2: 40 + »	0: 30
D:o (något enklare)	1: 75 + »	0: 30
D:o (mindre).....	0: 85 + »	0: 30
Esperantoflagga .....	0: 50 + »	0: 08
D:o (miniatyr)	0: 15 + »	0: 04
»La Espero» gamla årgångar (1913 och 1914) pr årgång, portofritt	1: —	

## S. E. F.

Inbetalda årsavgifter för år 1916:

Jönsson, G., *Bomhus.*  
Hoffman, Gust., *Gävle.*  
Ros, Erik, *Gullspång.*  
Strandberg, Ax., *Halmstad.*  
Olsson, Carl, »  
Pettersson, Oscar, »  
Träff, Uno C., *Smålandsstenar.*  
Eriksson, J. E., *Sala Damm.*  
Larsson, Adolf, Liv-Thule, *Stockholm.*

Kvitteras Gävle den 26/4 1916.

*J. Helsing, Kassör.*

1916 års Nyheter i  
**HATTAR**  
alla priser från 3:50 till 12:— kr.  
Största urval hos  
**AXEL LIDHOLM**  
Drottninggatan 30 — **Gefle**

**Esperantopapeter** i kartong, 25 ark brevpapper +  
25 kuvert, damf. 1:50  
,, d:o, d:o, herrformat 1:65  
**Esperantocopiepennor**, 30 öre st., 3:— kr. dussin  
(hårda eller lösa).  
**Esperantoblyertspennor**, 10 öre st., 1:— kr. duss.  
(hårda eller lösa).  
Allt franco.  
Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**


**För nybörjare**   
är en grundlig **Korrespondens-**  
**Kurs** i esperanto utarbetad av  
undertecknad. Begär prospekt!  
**R. PEHRSSON, 3-23, Gävle.**

**Röda näsor!!**  
**ISSALVA** är ett patenterat, ofar-  
ligt, av läkare uppfunnet kosmetiskt medel,  
som på kort tid hjälper absolut mot **an-**  
**siktsrodnad** (röda näsor), **hyla, önnar, rev-**  
**ormar, fräknar** och **solbränna**. Försäljes i  
**Vita Korset.**

**Bröderna Blombergs**  
**Speceriaffär**  
GÄVLE  
N. Kungsgatan 13. ☐ Tel. 897.  
**Rekommenderas!**

**SKODON**  
Största sortiment hos  
**A. M. Zimmerman & Co**  
GÄVLE

**ESKILSTUNAKVARNEN "SVEA"**  
Av hrr lantbr. välkänd. Över 600 st. sålda.



**Bästa husbehovskvarn**  
lättgående, lättskött.  
Med patent skyddad  
konstruktion. I 4 stor-  
lekar! Krossar och grö-  
per alla sädeslag; fin-  
maler för brödbakning.  
Liggande, massivt gjut-  
na självsjärpande ste-  
nar; fjädrande skydds-  
anordning, S. K. F. kul-  
lager; liggande eller stå-  
ende remskiva. *Se upp*  
*för efterrapningar.*  
Sveaskiten, i kombina-  
tion med kvarnen utgör  
ett helt kvarnverk för  
husbehov. *Begär pris-*  
*kurant o. intygssamling.*

**A.-B. EKMAN & BRUNNKVIST**  
Eskilstuna. Rt. 1075, 1066.

**Kiam** vi bezonas  
viandon, mendu  
ê  
**FRANS A. OLSON**  
Telef. 34 GEFLE Telef. 34

**Centralhotellet**  
GEFLE  
**REKOMMENDERAS!**

**Wickmans Kappaffär**  
NORRA KUNGSGATAN 7 GEFLE  
Vid Rådhusplanaden.  
**Kappor o. Promenaddräkter** i stort urval.  
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.  
**RIKSTELEFON 1391.**

**Fotografiskt**  
**Magasin**  
Aktiebolaget Axel Karlstrand  
Tel. 1227. **Gefle.** Tel. 1227.

**Juvelerare E. Johansson**  
Nygatan 37, GEFLE.  
**Moderna modeller. Billiga priser.**  
**Vackra Förlovningsringar.**  
Obs! Order från landsorten expedieras omg.  
mot postförskott.

**N. Lundgren**  
GEFLE Interurba tel. 151  
**Kamentuboj por fabrikoj.**  
Pli ol 850 konstruitaj.  
Riparoj dum uzado.  
Fulmkonduktiloj estas muntataj.  
Propra brikejo en Upsala.  
Plej granda firmo por konstruo de  
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.  
Argenta medalo en Stockholm 1897  
» » » Gefle 1901  
» » » Norrköping 1906

**Vartför skall Sverige stå efter**  
de stora länderna i fråga om Espe-  
rantos spridning?  
Rekvirera propagandabladet och visa  
alla Edra bekanta!  
Pris för 3 st. 10 öre, 100 st. 1:35,  
500 st. 6:— och 1000 st. 10:— allt  
portofritt från  
**Sveda Esperanta Federacio, Gävle**

**E. Liljemarks**  
Cigarr- och Tobakshandel  
S. Centralgatan 28 och S. Kungsgatan 26  
**rekommenderas!**  
Prima varor till billigaste priser.

»Mi vojon trovos aŭ preparos.»  
Neniam estis tago ne kune al-  
portanta sian propran okazon por  
fari ian bonajon neniam antaŭe  
povintan kaj neniam plu povontan  
esti farata. *W. H. Burleigh.*

**Gust. Holms Förstoringsanstalt**  
Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 1628.  
Faras pligrandigojn laŭ fotografajoj.  
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

**KOM IHÅG**  
**Nya Konfektaffären**  
Nygatan 26, GEFLE.  
**Stor sortering i praliner.**

**KARL NILSÉNS**  
**Skrädderiaffär**  
N. Gungsg. 28, GEFLE. Tel. 1144.  
**REKOMMENDERAS!**

**Tablotranĉiloj**  
**Poŝtranĉiloj**  
**Raztranĉiloj**  
**Tondiloj**  
Estas aĉetataj plej mal-  
multekoste  
En Eskilstunaboden.  
Rådhusorget, GEFLE, Svedujo.  
Tel. 75.

**La Espero bezonas 10,000**  
**novajn abonantojn.** Ĉu vi  
helpos nin akiri ilin?

**Esperantister!**  
Tagen som Eder plikt att gynna  
tidningens annonsörer!

**Damer!** Beställ Eder promenaddräkt hos **Axel Johansson.**  
N. Kungsgatan 17, Gävle. Tel. 1939.

